

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

merkredon, la 6-an de Julio, 2016 • numero naŭ

Vi finis la kurson... kaj nun kio?

de Chuck SMITH



Saluton el Berlino! Mi multe ĝuis mian tempon ĉe NASK en 2004 kaj utiligis multajn aferojn,

kiujn mi tiam lernis por kunkonstrui la kurson de Duolingo, kiun vi ankaŭ eble sekvis. Sed baldaŭ vi vojaĝos hejmen kaj pensos: “Kiel mi povas daŭrigi mian lernadon eĉ se mi ne plu estas ĉe NASK?”

Ne zorgu, multaj lernantoj de Duolingo havis ĝuste la saman problemon, do mi listigis multajn eblajn vojojn.



Jen la loko de la ne tre bone kaŝita ovo-alkovo, kiun trovis Ellen antaŭ kelkaj tagoj.

Ne gravas ĉu vi preferas kurson, muzikon, filmetojn aŭ librojn, ni havas ion por vi. Eble vi ŝatus kunlabori en projektoj por la movado aŭ simple babili en la nova esperantista gruparo de Telegram. Ĉiukaze, ĉion ĉi vi povas trovi ĉe:

www.afterduolingo.com

Se vi estos en Berlino aŭ ĉe la venonta IJK en Pollando aŭ UK en Slovakujo, certe salutu min nome de la NASK-anoj. Mi ĝojus aŭdi pri viaj spertoj. Bonan vojaĝon per flugiloj de facila vento!

Ŝtrumpetoj

de Elizabeto DORCAS

Ŝtrumpeto ruĝa
Ŝtrumpeto rosa
Ŝtrumpeto sube
Ŝtrumpeto varma
Ŝtrumpet' lasita
Ŝtrumpeto sen par'
Ŝtrumpet' nepina
Ŝtrumpeto ĉarma

Lasta ŝerco

De Derek ROFF


Aŭdita en la supera kurso marde:
Kial la vorto “bideo” estas tre Esperanta vorto?
Ĉar en ĝi estas interna “ideo”.

Novaja de anti-cool

La kreinto de Plena Rondo ĵus anoncis novan TTT-ejon por la filmo:
www.plenarondo.com

Kio okazos hodiaŭ?

- ★ 7:30 – 8:15 atm
matenmanĝo
Belk Dining Hall
- ★ 8:30 – 12:15 atm
lecionoj
Flowe
- ★ 12:30 – 1:15 ptm
tagmanĝo
Belk Dining Hall
- ★ 2:00 — 3:15 ptm
libera tempo por pakado, ktp.
- ★ 3:15 — 4:30 ptm
muzika spektaklo de Ĵenja kaj Bertilo en la teatro Leggett (2-a etaĝo de Main)
- ★ 5:45 — 6:30 ptm
vespermanĝo
Belk Dining Hall
- ★ 7:00 – 7:45 ptm
diplomiĝa ceremonio
Flowe



Ne forgesu!

- Bonvolu remeti viajn kaf- kaj te-tasojn en la kuirejon (en la tria etaĝo de la dormejo) antaŭ la muzika programo hodiaŭ posttagmeze.
- Nepre redonu vian ŝlosilon al Ellen antaŭ via foriro! Se ŝi ne estas en sia ĉambro, metu la ŝlosilon sub ŝian pordon.

